FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2001



Feliĉan Novan Jaron 2002

Harmonia jarkunveno en Bad Salzuflen

Estas apenaŭ kredeble, ke la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) povis sinsekve aranĝi jam sian 45an jarkunvenon. Invitis tiujare Karl-Heinz Marzahn la Esperanto-komisiito por la nordokcidenta fervoja regiono, kaj venis pli ol kvindek GEFA-anoj kaj amikoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. Gastigis inter la 5a kaj 7a de oktobro 2001 la hotelo Roseneck de la Fervoja Socialorganizaĵo (BSW). Dum la festvespero ĉefkomisiito Rolf Terjung bonvenigis Werner Kraŭse, BSW-estro por la nordokcidenta regiono. Kraŭse esprimis sian ĝojon pri la laŭdinda agado de GEFA-anoj, kiuj superas lingvajn baraĵojn per Esperanto. Dieter Hartig, multjara redaktoro de la GEFA-organo Fervoja Esperantisto ricevis meritan dankon okaze de sia retiriĝo. Dankesprimoj direktis sin ankaŭ al Alois Haupenthal kaj Erhard Herlitze, antaŭaj fidelaj kimisiitoj por la BSW-distriktoj Saarbrücken respektive Köln. Dina Deloyer (Belgien), Elena Mateeva (Bulgario) kaj Emil Tudorache (Romanio) trandonis salutojn de sia landa asocio. Specialan ĝuon ofertis la tenoro Alfons Hoffmann. Akompanite de la pianisto Ulrich Mattke li kantis el sia klasika kaj popularа repertuaro. La vesperon akompanis per vervaj muzikaĵoj la Duo Belsono konata ĉe jarkunvenoj jam de jaroj. Ĝis noktmezo ili stimulis al agrabla dancado. La antaŭan tagon GEFA-estraro kaj komisiitoj okupiĝis en laborkunsido pri abunda tagordo. Estas traktitaj organizaj aferoj krome pasintaj kaj estontaj aranĝoj, precipe la taskoj por la IFEF-kongreso 2003 en Dresden, kies organizon GEFA transprenis. GEFA-prezidanto Gießner atendas favorajn antaŭkondiĉojn. La BSW-reprezentanto donis informojn pri la nuntempa situacio de la fondaĵo BSW. Samtempe la ceteraj kongresanoj vizitis la vidindaĵojn de la kuraca loko.

Tradicia posttagmeza ekskurso kondukis tra la aŭtune kolorigitaj aleoj kaj preter tipe vestfaliaj bienoj al la fama baziliko Corvey. Interne romanikstila kripto el la naŭa jarcento atendas respekton. Sekvis la iom tro rapida vizito al la apuda barokstila kastelo, iam benediktina abatejo, nun privata posedaĵo de nobela familio.

Alproksimiĝis la fino de la jarkunveno. La dimanĉa matineo komenciĝis per prelego de Dieter Hartig pri „Graffiti-ŝmirantoj sur la trajnoj". En videofilmo „Unufoje al Berlin kaj reen" ni vidis trafikajn scenojn en la siatempa ĉefurbo inter 1910 kaj 1990. Alia filmo montris le belan Nigran Arbaron. Tie, en idilia vilaĝo Baiersbronn, situas feria hotelo de la Fervoja Socialorganizaĵo (BSW), kie okazos la jarkunveno 2002 de GEFA. Agrabla muziko de la Duo Belsono akompanis tiun lastan programeron, antaŭ ol ni ankoraŭfoje tagmanĝis. La partoprenintoj kore dankas al Karl-Heinz Marzahn kun liaj helpantoj. Ili organizis modele la 45an jarkunvenon.

W.B.



Jarraporto 2000/2001

pri la periodo de jarkunveno Berlin, oktobro 2000, ĝis jarkunveno Bad Salzuflen, oktobro 2001

Enkonduko

Kiel en pasinta jaro, la danĝera situacio, en kiu troviĝas GEFA, ne ŝanĝiĝis. Fakte ne plu aŭ nur malfacile estas atingeblaj fervojistoj, specife junaj. Tio ne nur trafas nian asocion, sed aliaj kulturaj grupoj ankaŭ plendas pri tiu situacio. Tio kompreneble ne estas kaŭzo, por rezigni pri varbado ĝenerale. El la iama ŝtata fervojo DB intertempe ekzistas pli ol 40 diversaj branĉoj, filinoj kaj aliaj pli-malpli memstaraj grupoj. Kiu nun estas DB? En tiu situacio estas laŭdinda la „Fonduso Fervoja Sociala Asocio (BSW)", kiu tre subtenas nian GEFA.

Mortintoj

Regiono West:
Lonard Ebel (Essen)
Joachim Schrapp (Essen)
Albert Steinem (Essen)
Hans Dahmen (Köln)
Regiono Nordwest:
Günter Süßmut (Hannover)
Regiono Mitte:
Emil Dietrich (Frankfurt)
Hans-Jürgen Riehn (Dresden)
Regiono Südwest:
Erwin Isberner (Saarbrücken)
Brigitte Sitter (Stuttgart)

Je tiu okazo, mi ankoraŭfoje memorigas vin, sciigu al ni la morton de membroj kaj verku mallongan nekrologon por nia ĵurnalo.

Funkciuloj:

En nia Asocio kelkaj postenoj estis nove okupitaj. Ĉefkomisiito de BSW estiĝis Rolf Terjung kaj vicĉefkomisiito Joachim Gießner. Do, en la laborkoncilantaro deĵoras nun Rolf Terjung (HB), Joachim Gießner (VHB), Bodo Ehrlich (S) kaj Helga Vogelsang (F).

Ankaŭ inter la distriktkomisiitoj okazis kelkaj ŝanĝoj. Novajn funkciojn en la regiono West transprenis Manfred Retzlaff, nome la postenon de distriktkomisiito en Essen kaj Köln. Siegfried Krüger transprenis eĉ en tri distriktoj tiujn taskojn, nome en Stuttgart, Karlsruhe kaj Saarbrücken.

La redakcio de nia „Fervoja Esperantisto" troviĝas nun ankaŭ en novaj manoj, Tiun respondecan laboron transprenis Fritz Lautenbach, (kiu restas ankaŭ komisiito por instruado), kaj Horst Jasmann. En tiu kadro ankoraŭfoje meritas dankon ĉiuj estintaj funkciuloj pro siaj multjaraj meritoj. Tiuj estas Erhard Herlitze, Alois Hauspenthal kaj Dieter Hartig.

La interna administrado de GEFA restas en la manoj de Joachim Gießner kiel presidanto kaj de Karl Bernhard kiel kasisto.

Kursoj

Memstaraj kursoj de GEFA ne okazis; sed en kelkaj distriktoj kun kunelaboro de lokaj grupoj.

Honorigoj

Dieter Hartig estiĝis „Honora Membro" de IFEF. (Vidu artikolon en „Fervoja Esperantisto" 3/2001)

Joachim Gießner ricevis dankdokumenton flanke de BSW-estraro. (Artikolo en „Fervoja Esperantisto" 2/2001) kaj li estis honorigita en Tabor fare de IFEF, ĉar li kvindekfoje sen interrompo partoprenis IFEF kongresojn. (Artikolo en „Fervoja Esperantisto„ 2/2001.)

Kunelaboro kun IFEF

Aliĝis al la IFK en Tabor 16 el niaj membroj, sed partoprenis nur 12. La estraro de IFEF kaj la komitatanoj el la landoj decidis tie, (kun unu sindeteno), okazigi la kongreson 2003 en Germanio.

Faka kunlaboro:

Nia membro d-ro Heinz Hoffmann daŭre estas sekretario de la „Terminara Sekcio" kaj „Sekcio de „Faka Komisiono". Li reprezentas la Fakan Komisionon de IFEF en la terminogolia grupo de UIC.

Kunlaboro kun BSW

La kunlaboro kun BSW estas konstante tre bona. Nia ĵurnalo „Fervoja Esperantisto„ estos plu produktata kaj forsendata fare de centralo de BSW en Frankfurt. Por ŝpari monon estas planita eble kune aperigi du diversajn kulturgrupojn en unu ĵurnalo, sed nur, se tio estas oportuna kaj ambaŭ grupoj konsentas.

Aranĝoj kaj kontaktoj

Nia 45a jarkunveno okazis en oktobro en Bad Salzuflen. Partoprenis 54 personoj kaj gastoj el 4 landoj. La 46a jarkunveno 2002 okazos en la regiono Südwest, en Baiersbronn. Pro la IFEF.kongreso 2003 en Germanio, en tiu jaro ne okazos publika jarkunveno. Apud tiuj „oficialaj" aranĝoj, multaj membroj flegas privatajn kontaktojn en multaj landoj. Niaj „emerituloj" renkontiĝis en aprilo en Osnabrück kun 20 partoprenintoj. Kontaktoj kun lokaj Esperantogrupoj kelkloke estas intensivaj.

Informado kaj varbado

Okaze de „Bahntag" ankaŭ Esperantogrupoj prezentis sin en kelkaj lokoj kaj varbis por Esperanto. Aperis nova, tre alloga varbfolio, ĉefe verkita de Dieter Hartig. Estas rekomendinde disdoni ilin ankaŭ al nefervojaj grupoj kaj personoj. Nia organo „Fervoja Esperantisto" aperis kvarjoje en la jaro kun entute 38 paĝoj kaj 28 fotoj, enkluzive de aliĝilo por jarkunveno en Bad Salzuflen.

Perspektivo

La ĉefa aspekto de nia nuna situacio estas priskribita en la enkonduko. Ni ne rajtas atendi esencajn ŝanĝojn. Estas peza tempo por GEFA. Sed ne estas kaŭzo por resigni, Ni devas streĉi niajn ĉiuajn fortojn por labori por nia estonteco.

Rolf Terjung, ĉefkomisiito Esperanto

Rumana Fervojista Esperanto-Asocio
invitas vin al

34a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO SKISEMAJNO

en urbo Predeal
de la 16a – 21a de februaro 2002

La 43a IFES okazos en Rumanio, en Predeal apud Brasov. Aliĝkotizo ĝis 25a de decembro 2001 = 12,00 €, poste 20,00 €. Tranoktado en hotelo po persono/nokto en dulita ĉambro = 20,00 €, ĉe privatulo = 13,00 €. Predeal situas en bela naturregiono kun bonegaj eblecoj por skiantoj kaj neskiantoj. Ĉiuj trajnoj haltas tie. Certe neniu bedaŭros viziton.

Aliĝiloj ĉe ĉefkomisiito.

Achtung, Bezirksbeauftragte und Beauftragte für Sonderaufgaben!

Die „Frühjahrssitzung" des Arbeitsausschusses mit den Bezirksbeauftragten und den Beauftragten für Sonderaufgaben findet am Samstag, dem 16. März 2002, von 10.30 bis ca. 15.00 Uhr statt. Die Einladungen und Tagesordnungen für den Arbeitsausschuss gehen von der Zentrale Frankfurt und die für die BB von den Regionen zu. Tagungsort ist in der Fahrzeuginstandhaltung, Werk Fulda, (früher AW), im Konferenzraum unter der Kantine. Tagung ist einschließlich Mittagessen.

Anschließend setzt sich das LKK Dresden zu einer Besprechung zusammen.

Rolf Terjung, HB

Seminare im Internet

Ich habe von der Zentrale ein Schreiben mit folgendem Inhalt bekommen:

Wir möchten die Kultur- und Freizeitseiten im Internet um die Rubik „Seminare" erweitern und diese öffentlich ausschreiben. Wenn hierfür ihrerseits Interesse besteht, teilen Sie uns bitte die folgenden Seminarinformationen mit: Thema und Inhalt, Seminarziel, Termin, Ort, evtl. Voraussetzung, Anmeldung, Teilnehmergebühr.

Vielleicht findet demnächst irgendwo ein Seminar mit dem Thema „Esperanto" statt. Es braucht ja nicht unbedingt von GEFA veranstaltet zu werden. Wenn ggf. eine Veröffentlichung gewünscht wird, teilt es mir bitte mit.

Rolf Terjung, HB

Achtung Seniorinnen und Senioren!

Wir Seniorinnen und Senioren treffen uns zum traditionellen

Jahrestreffen

in der schönen und geschichtsträchtigen Stadt

Nürnberg

in der Gaststätte „**Weißer Löwe**", Pfannenschmiedsgasse 1, Die Gaststätte liegt seit 1566 mitten im Herzen der Nürnberger Altstadt, direkt an der Lorenzkirche und ist leicht zu Fuß oder mit der U-Bahn nach einer Station, (Haltestelle „Lorenzkirche"), zu erreichen. Wir treffen uns am

Donnerstag, dem 18. April 2002

um **10.00 Uhr**. Ende ist voraussichtlich **16.00 Uhr.**

Von 10.00 Uhr bis 12.00 Uhr ist Zeit zum Plaudern und um etwas aus der Geschichte Nürnbergs zu erfahren (in Esperanto). Nach dem Mittagessen führen uns ortskundige Begleiter durch die Altstadt. Mit dem „Nachmittagskaffee" klingt der Tag aus.

Übernachtungswünsche erfüllt der

„Verkehrsverein Nürnberg e.V." Postfach 42 48, 90022 Nürnberg,

Tel: 0911/2336-0, Fax: 0911/2336-166, E-Mail: tourismus@nuernberg.btl.de.

Rolf Terjung, HB



Kaŝtanarbo en Mariazell (AT)

en Somero 2001,

plantita en majo 1994

okaze de 46a IFEF-Kongreso.

Aus den Gruppen / El la grupoj

Bremen

Gaja, feliĉa, sunplena ĝardenfesto.

En la ĝardeno de nia membrino s-ino Bohn. Plej multaj de niaj gemembroj partoprenis kaj aranĝis sin komforte ĉirkaŭ la bela, granda juglandarbo. La rostilo diligente funkciis, por ke ĉiu ricevu sia(j)n vianda(ĉ)ojn. Ankaŭ trinkaĉo ne mankis kaj la interbabilado, plejparte en.Esperanto, vigle kaj gaje plezurigis la ĉeestantojn.
Tiu kunveno estas unu el la plej agrablaj el la jara programo.
Krepuskis jam kiam ni kun severa danko adiaŭis.

Vizitotago en la lokomotivriparejo Bremen la 8an de septembro
Nur malmultaj membroj de la grupo Bremen mankis. Kelkaj alvenis per specialaj navet-trajnoj. Bodo Ehrlich, laboranta kiel inĝeniero en la riparejo, gvidis nin tra speciale interesaj objetoj kaj maŝinoj, el kiuj multaj laboris komputildirektitaj.
Kulmino, sendube estis por ni esperantistoj la muzikado de la nederlanda grupo „Kajto", kiu ĉefe kantis en Esperanto.

Honorofica okupo en nia movado estis la temo de la prelego de Dieter Hartig la 17an de oktobro en nia kunvenejo.
Pro la Jarkunveno en Bad Salzuflen, kiun ni el Bremen aranĝis, la informilo ne estis sufiĉe frue preta, sed tamen ĉiuj interesitaj membroj venis. Tio certe ne signifas, ke nia Informilo estas superflua.
Laŭ la reagoj kaj la vigla diskuto poste evidentiĝis, ke la temo estas grava.

Interesitoj informiĝu: <www.esperanto.de/bremen> Hg

Frankfurt

Das monatliche Treffen der Esperanto-Gesellschaft zusammen mit der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt am 4.10.01 in Frankfurt sah das Hauptthema

„Zustand der Europa-Union (EU) nach Nizza"

vor. Der Referent des Abends, Herr Edgar Müller, aus dem Saarland hat bei der EU gearbeitet, in mehreren Staaten der EU gelebt und die Entwicklung der Union laufend beobachtet.
Er legte die „Säulen" der EU
1. EU-Kommission, EU-Parlament
2. Gemeinsame Außen- und Sicherheitspolitik
3. Zusammenarbeit Außen- und Innenpolitik
als Grundpfeiler dar. Dabei führte er aus, daß nur Teil 1 funktionsfähig ist, die beiden anderen jedoch leider nicht.

Im Hinblick auf die Einführung des EURO bemerkte er, dass dadurch eine bessere Geldordnung in der Welt angestrebt werde. Dies hätten selbst schon Länder au ßerhalb des Euro-Gebietes, wie z.B. Russland, aufmerksam registriert und würden nur noch in EURO zahlen, schon wegen der Befürchtung, dass es zu einer erheblichen Erhöhung des Dollars komme.
In der Diskussion wurde u.a. darauf hingewiesen, dass bei kürzlichen Reisen in Nicht-Euro-Länder in Europa der EURO seine Schatten schon merklich vorauswerfe, dass z.B. bei Reisen in die Schweiz die auslaufende DM erheblich an Wert verlöre unbd man nicht mehr angetan sei, DM in SFRS zu wechseln.
Weiterhin wurde eingeworfen, dass z.B. England durchaus in Europa mitentscheiden wolle, sich jedoch nicht der künftigen gemeinsamen Euro-Währung anschließt. Sollte das heißen, dass im Falle eines Euro-Fiaskos (wie viele befürchten) das englische Pfund dann die führende europäische Währung werde, und damit England (und USA) nicht nur sprachlich (wie ohne jede Entscheidung der Menschen Europas praktiziert werde) sondern auch finanziell (monetär) die Hegemonie in Europa anführen?!
Dem Redner des Abends gebührt für den in Esperanto gehaltenen Vortrag Dank und Anerkennung.

Duisburg

„Kennen Sie die Namen unserer Bäume in Esperanto?"

So lautete das Thema eines Gruppenabends der **Duisburger** Esperantogruppe. Eigentlich findet der Gruppenabend immer in der Begegnungsstätte der katholischen Pfarre Ludgerus in Duisburg-Neudorf statt und dauert gewöhnlich zwei Stunden, wenn nicht gerade ein gemeinsames Essen ansteht.
Diesmal war ein gemeinsames Treffen in freier Luft, in Duisburg-Bissingheim, das vom weitläufigen Wald umgeben ist, angesagt, Ob jeder seine Hausaufgaben gemacht hat? Auf der anderen Straßenseite fing es schon an. Ist das nicht Weißdorn? Ja, es war „kratago". Niemand wusste den Esperantonamen. Dann wurde es besser. Eiche = „kverko" wusste jeder. Buche = „fago" auch. Aber war es eine „Hainbuche" = „karpeno" oder eine „Rotbuche" = „ordinara fago?" So viel Wissen war nicht gefragt. Aber dass der Name „Rotbuche" nicht von roten Blättern, sondern von dem etwas roten Holz kommt, war doch interessant zu erfahren. (Die Buche mit den roten Blättern heißt übrigens „Blutbuche" und ist eine Variante der „Rotbuche".) Es ging weiter mit Tanne = „abio", Fichte = „piceo", Kiefer = „pino", verschiedenen Weiden = „saliko" und so weiter und so fort. Dann wurde noch ein interessanter Punkt im Wald gefunden, nämlich eine Waldwirtschaft.
Der Gruppenabend dauerte diesmal keine zwei, sondern vier Stunden.

R.Terjung



Ni funebras

†WILLI SCHÄFER.
Nia fidela membro kaj partopreninto de multaj jarkunvenoj kaj kongresoj „Willi" (la kapitano) ne plu estas inter la vivantoj. La 21an de oktobro li forpasis en malsanulejo en Stuttgart. Semajnon antaŭe mi ankoraŭ vizitis lin. Willi suferis je ne kuracebla malsano. Antaŭ pli ol duona jaro li ricevis tian informon. Sed li ek de tiam realtive bonfartis. Nur liaj lastaj tri semajnoj estis tempo por li ekkoni la gravecon de la malsano. Li multe dormis, ricevis kontraŭdolorajn medikamentojn, estis vizitata de amikoj kaj finfine pace forlasis nin en la kristana espero. Willi ne deziris ceremoniojn okaze de forpaso. Lia cindro en urno estis anonime enterigita. Restas la memoro al por mi patra amiko, kiu havis longan surteran vivon (preskaŭ 88 jaroj). Li havis vere „verdan koron", kvankam li pro gravega akcidento antaŭ jardekoj nur malfacile lernis nian lingvon. Sed helpe de la germana, franca kaj la nederlanda li ĉiam sukcesis interkompreniĝi.

Siegfried Krüger

†ALBERT STEINEM,
unu el niaj plej aĝaj membroj, mortis en aŭgusto en la aĝo de 90 jaroj. Li estis longdaŭra ano de la Monastera GEFA-grupo, kvankam ne plu aktiva dum la lastaj dudek ĝis tridek jaroj. Kiel URSULA SCHRAPP diris al mi, ALBERT STEINEM kaj JOCHEN SCHRAPP estis amikoj ek de ilia junaĝo. Ili lernis Esperanton kune dum la milito en Pollando. Poste ili ambaŭ estis fervojistaj kolegoj kaj aktivaj membroj de la Monastera Fervojista Esperanto-grupo. ALBERT STEINEM eĉ instruis Esperanton en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento. Antaŭ dudek ĝis tridek jaroj li iom malaktiviĝis rilate Esperanton, okupis sin pli pri la itala lingvo, ĉar lia filino ekloĝis en Italio. Sed li restis fidele GEFA-membro ĝis sia morto. Mi mem vidis lin nur unufoje en la klubejo en Münster. Li vivis de 23.03.1911 ĝis 26.08.2001.

Manfred Retzlaff

Fervojaj novaĵoj

La likvido de naŭ DB-riparejoj ligita kun eventuala perdo de 5900 laborlokoj forte okupas DB. Oni esploras transdoni la riparejojn al industriaj entreprenoj inkluzive la personaron. Laŭ indiko de DB la kapacito de tiuj riparejoj ne plu estis sufiĉe uzita.

La nova grandrapida fervojlinio inter Köln kaj Frankfurt estas finkonstruita. Nuntempe esploras speciala trajno, plena da mezurinstrumentoj, la trakojn. La ekspluatad-aperigo de la fervojlinio efektiviĝos nur aŭtune de 2002.

DB kaj Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj (ÖBB) kreis komune uzeblan stokon de 50 lokomotivoj. Celo: plibonigi la limojn trapasantan kargotrafikon sen lokomotiv-ŝanĝo. Oni atendas, ke aliaj eŭropaj fervojoj aliĝos.

Post plurjara traktado de la ĝisnuna kapstacio Stuttgart estas finance certigita, samtempe ankaŭ por la nova grandrapida fervojlinio Ulm – Stuttgart. La konstru-laboroj komenciĝos supozeble en la jaro 2004.

La fervoja DB-reto restas plue rekta posedaĵo de DB. La politikuloj intencis redoni ĝin al la ŝtato, kiu postulas pagon de la DB por la uzado.

Ok bileteldonejoj de Svisaj Ferderaciaj Fervojoj (SBB) vendas provmaniere enirbiletojn por koncertoj, sportaj kaj aliaj aranĝoj. Post pligrandigita vendado la SBB volas vendi ĝis 2004 en Svisio la plej multajn enirbiletojn.

Por liveri karbon alvenintan el eksteraj landoj en la haveno Rotterdam, DB organizas kombinitan transporton per kargoŝipoj kaj vartrajnoj. La intertempan stapladon kaj sekvan liveradon al la ricevonto, la firmao Bayer, transprenas alia trafikentrepreno de DB.

Fonto: BAHNZEIT W.B.



R	B	M	A	R	E	G	E	J	O
S	I	G	N	A	L	O	B	Ŝ	V
U	T	R	A	K	O	Z	I	H	I
O	K	O	C	N	R	F	P	E	T
Ĝ	S	I	T	F	A	L	D	Ĵ	O
O	M	C	R	R	T	E	Ĝ	I	M
L	S	T	A	C	I	D	O	M	O
R	A	R	J	O	F	U	L	Z	K
O	O	C	N	D	P	K	A	J	O
H	V	J	O	L	E	R	J	K	L

Esperantowörter suchen

In diesem Wörter-Suchspiel sind 10 Esperantowörter verborgen, die Anlagen in einem Bahnhof bezeichnen. Die Wörter können waagerecht, senkrecht oder auch diagonal im Diagramm stehen, sie können sich überschneiden und rückwärts geschrieben sein. FL

Die Lösung finden Sie in FE 1/02

Folioj sinkas mallaŭte

Mutiĝo kaj senkoloriĝo:
La vento flate min tuŝetas,
foliojn arboj nun demetas;
min ravas tiu formortiĝo.

Foriĝas de ĉi tie ĉio,
la amon oni jam forgesis,
la birdoj longe kanti ĉesis,
mallaŭte sinkas la folio.

La birdoj estas forflugintaj,
iliaj nestoj videbliĝas,
folioj lacaj subeniĝas
de branĉoj senfoliiĝintaj.

En la arbara susurado
alblovas min sciigo iu,
ke estas formortiĝo ĉiu
sekreta, gaja nur sanĝado.

Verkita de Lenauo, Nikolao (1802 - 1850)
Esperantigis: Manfredo Ratislavo
en 1997-12 gis 1998-02 lau la origina
germanalingva teksto.

Blätter sinken leise

Rings ein Verstummen, ein Entfärben:
Wie sanft den Wald die Lüfte streicheln,
sein welkes Laub ihm abzuschmeicheln;
ich liebe dieses milde Sterben.

Von hinnen geht die stille Reise,
die Zeit der Liebe ist verklungen,
die Vögel haben ausgesungen,
und dürre Blätter sinken leise.

Die Vögel zogennach dem Süden,
aus dem Verfall des Laubes tauchen
die Nester, die nicht Schutz mehr brauchen,
und Blätter fallen stets, die müden.

In dieses Waldes leisem Rauschen ist
mir, als hör' ich Kunde wehen,
dass alles Sterben und Vergehen
nur heimlichstill vergnügtes Tauschen

Origina germanalingva teksto de
NIKOLAUS LENAU (1802 - 1850)

Burg Hohenzollern das Ausflugsziel für die GEFA-Jahresversammlung 2002



Hier vereinigen sich landschaftliche Schönheit und deutsche Geschichte

Unsere Jahresversammlung 2002 findet vom 11. bis 13. Oktober im BSW-Hotel „Haus am Kurgarten" in Baiersbronn bei Freudenstadt statt.

Näheres in unserer nächsten Ausgabe

Redaktfino por FE 1/2002 estos la 15.02.2002
Stiftung Bahn-Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f.lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jassmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361